



julio/aŭgusto 1967

# NEDERLANDA ESPERANTISTO

„La Estonto Estas Nia” - 32-a jara n-ro 7/8  
Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio

---

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.  
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

---

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

---

## IONESCO KAJ SARTRE EN ESPERANTO

Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Junulara Kongreso en Rotterdam.

Prezentoj de modernaj teatraĵoj kiel „La leciono” (La leçon) de Eugène Ionesco kaj „Sen eliro” (Huis clos) de Jean-Paul Sartre en la Internacia Lingvo Esperanto troviĝas inter la kulturaj eroj en la programo de la 52-a Universala Kongreso de Esperanto, nun urĝe organizata en Rotterdam. La Kongreso, kiu verŝajne ricevos ĉirkaŭ 1000 partoprenantojn, devis okazi en la sama tempo (2 ĝis 9 aŭgusto, 1967) en Tel Aviv, sed la milito en Mez-Oriento interrompis la preparojn kaj necesigis la subitan transsalton al Nederlando. Rotterdam gastigos samtempe ankaŭ Jarkongreson de la monda organizaĵo de la Esperanto-parolanta junularo (TEJO), ankaŭ ĝi „rifugiĝinto” el kongresurbo en Izraelo.

En la laborkunsidoj de la Universala Esperanto-Kongreso, partoprenantoj el 30 ĝis 40 landoj diskutos pri la aplikado de la lingvo en fakoj kaj profesioj, pri la instruado de Esperanto en lernejoj kaj -okaze de la Internacia Jaro de Turismo 1967 - pri la uzo de la Internacia Lingvo en la sfero de turismo.

Aparta programero estas la Internacia Somera Universitato, en kiu universitataj profesoroj el diversaj fakoj kaj diversaj

---

## UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO EN ROTTERDAM

### Publika deklaro de la ĉefestraro

Kiel vi jam scias, la Estraro de U.E.A., post la necesaj interkonsiliĝoj, decidis ne okazigi la 52-an U.K. en Tel Aviv, pro la bedaŭrinda situacio tie estiĝinta kaj elektis nian urbon Rotterdam por tiu celo.

Estas memkompreneble, ke nia Ĉefestraro unuanime kaj plene konsentas kaj apogas tiun decidon de la Estraro de U.E.A. kaj tutkore deziras, ke la U.K. fariĝu tamen grandioza sukceso, malgraŭ la mallonga tempo disponebla por la aranĝado kaj organizado.

Samtempe ni alvokas ĉiujn nederlandajn esperantistojn ankoraŭ aliĝi al la Kongreso, por tiel ĝui tiun senegalan eventon. Aliĝoj povas okazi ĝis la *15a de julio*, laŭ favora tarifo. Pri tio petu informojn ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.

Nome de la ĉefestraro,  
La Aganta Prezidanto de LEEN.  
J. Calado.

## ASOCIAJ INFORMOJ

Jarkunveno 1967.

Kelkajn tagojn antaŭ la Jarkunveno je la 27-a de majo en Utrecht la prezidanto de L.E.E.N. s-ro Kervers sendis informon ke la kuracisto ordonis al li ĉesi ĉiujn ne-profesiajn laborojn. La ĉeestantoj en la jarkunveno sendis salut- kaj bondezirtelegramon al li.

La kunveno decidis prokrasti elekton de prezidanto kaj konsentis ke s-ro Calado, kiun la estraro elektis vic-prezidanto, dum la vaka periodo prezidos.

Post diskutoj oni elektis f-inon Middelkoop kaj s-ron Hoekstra estraranoj de L.E.E.N. Oni reelektis s-inon Lok-van Putten kaj s-ron Boersma.

La ĉefestraro de L.E.E.N. ekde la jarkunveno 1967 estas:

### Aganta prezidanto:

*S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12. Tel. 010-189481.*

### Sekretariino:

*S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage. Tel. 0 70 - 66 96 69.*

landoj - Britujo, Hispanujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Usono, Danujo kaj Francujo - prezentos al internacia publiko la plej novajn esplorojn el la koncernaj sciencoj . . . ankaŭ tio, kompreneble, tute en Esperanto.

Sartre kaj Ionesco ne estos la solaj dramistoj, kies verkojn enscenigos en Rotterdam la Internacia Arta Teatro el Parizo. Kongresanoj lacigitaj de laborkunvenoj havos okazon distriĝi ĉe komedioj de tri jugoslavaj verkistoj kaj ĉe gaja vovedilo originale verkita en Esperanto de la hungaro Julio Baghy.

La cetera programo antaŭvidas Oratoran Konkurson por la junularo (specimena temo: „La batalo kontraŭ malsato kaj analfabeteco”), Belartajn Konkursojn, du novajn filmojn en Esperanto (el Usono kaj Hungarujo), Internacian Balon, Diservojn kaj aliajn erojn. Kiel Kongresejo estas elektita la nova koncertejo kaj kongrespalaco „De Doelen”, inaŭgurita en 1966. La junularo, siaflanke, elektis loĝi en nove ekipita ŝipo „Jan Backx”, kie ili intencas (interalie) danci sur la ferdeko!

### Kasistino:

*S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).*

*Tel.: 0 25 60 - 76 15.*

*Poŝtĝirkonto 3 45 63 je la nomo de la unuigo.*

*S-ro B. R. Beekhuysen, Noorsestraat 17, Delfzijl.*

*S-ro T. Boersma, Borniastraat 95, Leeuwarden.*

*S. O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl. Tel.: 0 22 09 - 5 65.*

*F-ino D-do A. J. Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum.*

*Tel.: 0 29 50 - 4 33 20.*

*S-ro R. Slot, Ernst Casimirlaan 21, Zeist. Tel.: 0 34 04 - 1 52 28.*

Se iu sekcio deziras aranĝi landan kongreson, la sekvonta jarkunveno okazos dum tiu ĉi kongreso. Eventuale povos okazi tutlanda renkontiĝo por ĉiuj nederlandaj esperantistoj; tiukaze la jarkunveno estos je la 25-a de majo 1968, denove en Utrecht.

## EL LA SEKCIOJ

### FRISA ESPERANTISTA RONDO.

*Sekr.: Goutumerdijk 18, Leeuwarden.*

Jam la 20an de majo, kiam okazis nia publika Izraela Vespero en Hotelo „De Kländerij”, la situacio en la Meza Oriento estis kritika, sed la vortoj de radio-reportanto en la vespero de la 19a estis sufiĉe trankviligaj kaj je tiu fono ni travivis kun proks. 80 gevizitantoj la vesperon.

La prezidantino de F.E.R. informis pri la Universalaj Kongresoj kun speciala atento pri la antaŭvidita en Tel Aviv.

La 19-jara Leeuwardena William Lord (de patra flanko de Kanada deveno), kiu post ricevo de sia diplomo de komerca lernejo dum 8 monatoj migris tra Izraelo, kaj kiu laboris kaj lernis kiel ne-Izraelido en „kibuco”, rakontis ion pri tiuj komunumoj, klarigis siajn mem-faritajn multajn kaj belegajn diapozitivajn kaj respondis plurajn demandojn el la publiko.

Grupo de geanoj de kurso por popoldancgvidistoj de Fryske Kultuerried kaj Nederlandse Vereniging van Volksdansleiders prezentis ses Izraelajn dancojn, kiujn ili ĝuste studis por sia ekzameno en junio. Kundancis nia ano, s-ro Duys el Bergum, kiu tie instruas, kiel Esperanto-L.O.-instruisto, Esperanton ĉe „ulo” (kie

## NOVAJ LIBROJ

**Kie boacoj vagadas** — aro de ĉarmaj noveloj . . . . . f 4,30

**Esperanta Mozaiko** — serio de sciindaĵoj sur terenoj diversaj . . . f 4,50

*Mendu ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Borniastr. 95, Leeuwarden, Ĝirkonto 76915*

li ankaŭ instruas aliajn fakojn).

La Izraela Trafikoficejo en Amsterdamo oferis sur ĉiuj tabloj plurajn ekzemplerojn de tri belaj turismaj faldfolioj.

Ni povis laŭtlegi interesan leteron el Izraelo de nia sekretariino, f-ino Yfke Weidema, kiu tie ĝuste libertempis.

Estraranoj de fotoklubo de NIVON manipulis la projektilon, kiun ni pruntis de tiu asocio. Kun NIVON ni interkonsentis pri estonta plua kunlaboro.

### Rezulto Esperanto-ekzamenoj.

De la sekretario de la Ĝenerala Nederlanda Esperanto Ekzamenkomitato ni ricevis la rezulton de la okazinta ekzameno je la 13-a de majo 1967-a en Amersfoort.

	aliĝis	sin anoncis	sukcesis
Diplomo E	23	22	17
Diplomo M	6	6	4
Diplomo S	8	8	6

Sukcesis por diplomo E (elementa): H. Allaries, F. Bastiaan, R. Bos, Z. Boven-Slin, S. Breuker, E. Burg, F. Feringa-Smit, E. Hofman, H. de Jong, I. Koopmans, A. Nijhoff, S. Oderkerk-Zoest, G. Pieterse-Jalaguier, G. Takens-Bakker, J. van Urk-Palland, E. v. d. Veen kaj J. J. Veldhuizen.

Sukcesis por diplomo M (mezgrada):

M. v. d. Kooij-Waal, R. Moerbeek, C. Schoonman kaj T. v. Woerden-v.d. Graaf. Sukcesis por diplomo S (supera): T. Bakker-Kroon, Tj. Boersma, R. Hanse, R. Koopmans, B. Muizelaar-Borger kaj E. Rijsbaerman-Adriaanse.

### Ankoraŭ ekzameno S en decembro 1967.

Ĉe la starigo de la diplomo Esperanto en la elementa lernejo (Staatsblad no. 307, 1964) estas i.a. decidita, ke la posedantoj de la B-diplomo (instrua kapablo) aŭ la S-diplomo (supera kapablo), donita antaŭ 1-1-1968, ankaŭ havas la rajton instrui Esperanton en la elementaj lernejoj. Por

doni al instruistoj kaj docentoj la okazon akiri la diplomon-S antaŭ la unua de januaro 1968, pro kio ili ne bezonas akiri la e.I.-diplomon, la Ĝenerala Nederlanda Ekzamenkomitato ankoraŭ organizos en decembro 1967 ekzamenon por la diplom-S, kondiĉe, ke sin anoncu sufiĉe da kandidatoj. La anonco por tiu ĉi ekzameno okazu antaŭ la unua de oktobro ĉe la sekretario/kasisto de la Ekzamenkomitato, S-ro G. Ellerman, de Clercqstraat 42, Amsterdam-W.

Povas esti, ke oni ĉe sufiĉe da interesiĝo ankaŭ aranĝos samtempe ekzamenojn por la diplomoj E kaj M.

## RADIO-SERVO F.E.N.

La sube menciitaj radiostacioj nun uzas la jenajn ondolongojn kaj frekvencojn:

R O M O (dimanĉe, 21.00-21.20) 25,42 m 30,90m 41,24m (11800, 9710, 7275 kHz).

P E K I N O (vendrede kaj sabate, 21.00-21.30) 30,4m 32,1m 39,4m 42,4m 45,3m (9860, 9340, 7620, 7080, 6620 kHz).

L O N D O N O (la lastan vendredon de la monato, 22,30-22,45) 16,79m 19,49m 24,92m 41,32m (17870, 15390, 12040, 7260 kHz).

*Manuskriptoj por la septembra numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 15-a de aŭgusto. Ni nur akceptas ilin, se ili estas klare tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.*

*Ĉefestraro, administranto kaj redaktoro deziras al la legantoj agrablan kaj refreŝigan ferion.*

*La Redaktoro.*

## KONVERSACIO-KALENDARO NEDERLANDA-ESPERANTO.

*Mi subskribinta promesas, ke mi lernos la lingvon internacian de d-ro Esperanto, se estos montrite, ke dek milionoj da personoj subskribis tiun saman promeson.*

Jen la teksto de promeso, redaktita de D-ro Zamenhof, kiu estis ne nur idealista, sed ankaŭ tre realista persono. Pri tio atestas ankaŭ liaj vortoj: „Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam ĝin akceptis la tuta mondo”.

Pli kaj pli aŭdiĝas voĉoj, kiuj pledas por la apliko de Esperanto en la ĉiutaga vivo. Konstante kreskas la eldono de broŝuroj kaj faldfolioj en Esperanto. Bedaŭrinde tiuj presaĵoj kutime kuŝas en ŝrankoj, pro kio la ekstera publiko kaj tre ofte eĉ la esperantistoj ne spertas la utilon de nia lingvo.

Laŭdindan solvon tiurilate donis la Algemene Nederlandse Vereniging voor Vreemdelingenverkeer (Ĝenerala Nederlanda Societo por Fremdultrafiko) en la apliko de konversacio-kalendaro, kiun ĝi sendis al 400 turistinformejoj en Nederlando por pendigi ĝin sur okultrafan lokon.

La konversacio-kalendaro konsistas el ŝildo, sur kies supra parto staras verda stelo inter la vortoj ESPERANTO-NEDERLANDA. Sur la ŝildo troviĝas bloko konsistanta el 50 deŝireblaj folioj. La folioj havas du kolonojn. En la maldekstra kolono staras la kutimaj turistaj frazoj en la esperanta lingvo. En la dekstra kolono staras la traduko en la nacia lingvo.

La apliko de la konversacio-kalendaro havas la jenajn avantaĝojn:

- Ĉiu ne-esperantista vizitanto vidas la praktikan valoron de Esperanto, kio estas la plej forta instigo por lerni la lingvon.
- La deĵoranto ne bezonas lerni la lingvon jam antaŭe.
- La kostoj estas relative minimumaj.

Menciinde estas, ke la A.N.V.V. mem pagis la kostojn. Ĝi komprenis la valoron de la devizo „La apliko de Esperanto estas gesto de internacia ĝentileco”. Tiu, kiu ŝatas plian informon rilate ĉi tiun projekton, sin povas turni al Hans Bakker, U.E.A.-delegito, Van Tuyll van Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z.

## 52-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Rotterdam, 2—9 Aŭg. 1967.

OFICIALA KOMUNIKO.

*Aliĝado.* La limdato por aliĝo estas prokrastita ĝis la 15-a de julio 1967. Oni povas uzi la flavajn aliĝilojn de Tel Aviv aŭ samformatan paperon. Por la kotizoj validas la tarifo de la dua periodo: 77,— ned. gld. por nemembroj, 57,— ned. gld. por MA de UEA. Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.

*Loĝado.* Oni mendu loĝejon kiel eble plej baldaŭ. Nun la Loĝiga Servo disponas ankoraŭ pri nombro da litoj, sed ne eblas konservi ilin longe. La prezoj varias de 9,— ned. gld. (turista klaso) ĝis 45,— ned. gld. (luksa). Mendojn, faritajn por Tel Aviv oni tuj konfirmu por Rotterdam. Bonvolu precize indiki la datojn de alveno kaj foriro.

*TEJO-Kongreso.* Ĝi okazos en la kadro kaj je la samaj datoj de la Universala Kongreso, parte en kombinitaj aranĝoj. Ĉiujn pliajn informojn donos TEJO mem eĉ la adreso de UEA. La partoprenantoj loĝos en studenta hotelŝipo „Jan Baekx”.

*Ekskursoj.* Du samtempaj tuttagaj ekskursoj okazos je lundo, la 7-an: A-Aŭtobusa ekskurso tra la konstruata regiono „Eŭropoort” kun surealismaj pejzaĝoj. Reveno al Rotterdam je ĉ. la 18a horo. Prezo, ĉion inkluzive: 32,— gld. Tuja aliĝo nepre konsilinda! B - Ŝipekskurso tra la vasta rivero kaj havenaro kaj tra malnovaj riverbranĉoj en orienta direkto C - Ĉiutaga ekskurso tra Rotterdam kaj ĉirkaŭaĵoj. Vizito al ĉiuj vidindaĵoj. Okazos je ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo kaj mardo. Prezo: 12,— ned. gld.

*Postkongresaj aranĝoj.* D - Septaga aŭtobusa ekskurso tra tuta Nederlando. Ĝi ne povas iri, kiel unue anoncote, tra Beneluxo, ĉar en Nederlando mem jam tro abundas pitoreskaj, interesaj kaj nekona-taj lokoj. Forveturo el Rotterdam jaŭdon la 10-an de aŭgusto matene. Reveno al Rotterdam merkredon la 16-an de aŭg. je ĉ. la 18a horo. Prezo por sep tagoj, inkl. hotelojn, ĉiujn manĝojn, enirbiletojn, veturojn ktp: 350,— ned. gld. Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar la lokoj estas limigitaj.

## TRA LA LIBRARO

*JAROJ SUR TERO, memoroj originale verkitaj en Esperanto de Lakshmiwar Sinha. Eldono de Eldona Societo Esperanto, Malmö. Formato 19½ x 12½ cm., 126 paĝoj kun fotoj. Prezo: sv. kr. 16,— tole bindita; sv. kr. 12,— broŝurita. Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.*

Antaŭ la dua mondmilito la nomo de la aŭtoro regule aperis en la Esperanto-gazetaro. Li ja, estante hindu, dufoje kelk-jare loĝis en Svedujo, tie eklernis Esperanton de Androso Cseh, faris prelegvojaĝojn en la skandinaviaj landoj, en la bal-taj landoj kaj Polujo. Mallonge li estis en Nederlando. El lia plumo aperis diversaj verkoj en Esperanto kaj en la bengala resp. angla lingvoj. Mi mencias i.a. „Malsata ŝtono”, tradukitajn rakontojn de la hinda filozofo Tagore, „Hindu rigardas Svedlandon”, „Ĉio restas penso sed ne faro”.

En ĉi tiu nova verko li rakontas simplamaniere pri sia vivo, ekde la infanjaraj ĝis la lastaj jaroj. Li naskiĝis en grandbienula hejmo, estas unue edukita en vilaĝo de la avo, poste vizitis diversajn lernejojn kaj gimnaziojn. Kaptis lin la mizerastato de liaj samlandanoj en la komen-

Necesas agi rapide! Pluraj personoj jam antaŭpagis 150,— gld. La plenan sumon oni bonvolu pagi nepre antaŭ la 15-a de julio 1967.

E - Dua postkongresa aranĝo okazos en la bela restadejo „Pietersberg” en Oosterbeek apud Arnhem. Ĉarma naturo en proksimeco de arbaroj, kamparoj, erikejoj kaj rivero. Kvartaga trankvila restado, promenoj, allogaj duontagaj ekskursoj en ĉirkaŭaĵoj.

*Kongresa Libro.* Pro la gravaj okazintaĵoj kaj lastmomentaj ŝanĝoj, ne eblas ĉi-jare sendi la Kongresan Libron antaŭe. Ĉiu kongresano ricevos ĝin en sia kongresa dokumentaro. La kongresejon certe ĉiu facile trovos, ĉar ĝi troviĝas kontraŭe al la centra stacidomo.

Ĉiu aliĝinto ricevis bildkarton pri ĝi.

*Statistiko (je 14.6.67).* Aliĝis 898 personoj el 34 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario  
G. G. Pompilio,

caj jardekoj de la nuna jarcento, kio instigis lin kunhelpi al la plibonigo de la ekonomiaj kaj individuaj cirkonstancoj. Tiucele li vizitis Svedujon por ekkoni kaj eklerni slojdon, cele al enkonduko de tiu instrusistemo en lia hejmlando. Li konatiĝis kun la grandaj gvidantoj de Hindujo, Tagore kaj Gandhi, en kies institutoj li aŭ kunlaboris aŭ ricevis la necesan spiritan subtenon por akceli sian idealon. Kalejdoskope aperas antaŭ niaj okuloj liaj gepatroj, aliaj familianoj, la hinda vivo en grandbieno, junaĝaj rememoroj pri festaj kaj aliaj okazintaĵoj, la lernjaroj, la hindaj filozofoj, la restado en Eŭropo precipe en Svedujo. Rerigardante li konstata ke principe post la sendependiĝo de Hindujo kaj Pakistano la vivcirkonstancoj multe pliboniĝis, sed tamen restas ankoraŭ multo farenda. Nun, estante nesana, li verkis ĉi tiun volumon pro amo al Esperanto kaj al la idealoj de Zamenhof. Li finas jene: Jen estas tio, kio okazis vole-nevole en mia vivo, kaj mi ne pentas pro la jaroj pasigitaj sur la tero. La okcidentan leganton interesos la vivmaniero kaj kutimoj de orienta popolo, de granda lando kies cirkonstancoj dum la lastaj monatoj regule aperas en niaj ĵurnaloj, radio kaj televido. Kvankam la lingvaĵo ofte ne estas tute korekta, la stilo iom nekutima, mi povas rekomendi la enhavon.

P. M.

*JARLIBRO DE U.E.A. 1967, unua parto. Eldonis Universala Esperanto Asocio, Rotterdam. Formato 11½ cm x 15½ cm, 544 paĝoj, broŝurita. Nur por individuaj membroj de U.E.A.*

La antaŭparolo de la prezidanto de UEA, prof. Lapenna, pritraktas ĉefe la prezentadon de la „Propono por la solvo de la lingva problemo” al la UNO. Li akcentas plue, ke U.E.A. urĝe bezonas almenaŭ 10.000 individuajn membrojn, nome ĉ. 2500 pliajn.

Tiu ĉi gravega konsultlibro informas pri multe da faktoj rilate al la Esperanto-movado. Per koncizigo la amplekso malkreskis de 576 p. (1966) al 544 p. en la nuna eldono.

Bedaŭrinde la nombro da delegitoj malkreskis de 3605 en 1966 al 3475 nun (en Nederlando de 220 al 218).

Ankaŭ en ĉi tiu eldono mankas la laŭ mi tre utila listo de mallongigoj, uzataj

## AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

en la E-movado. Oni povus facile trovi lokon, forigante la longan liston kun nomoj de la dumvivaj membroj. Kiu fakte interesiĝas pri tiuj nomoj?

Por aktivaj Esperantistoj nepre nemalhavebla verko kun abundo da plej diversaj informoj, por ĉiutage esti konsultata, plej ofte kun sukceso.

H. G.

*EL HOMBRE EN SU CAMINO / LA HOMO SUR SIA VOJO, Krestomatia Lernolibro Hispana-Esperanto, de Prof. Manuel Fernández Menéndez. Eld. „La Bona Semisto”, Casilla de Correo 863, Montevideo (Urugvajo), 1965. 376 p., 20 x 15 cm., bindita. Prezo Us. \$ 4.00 frankite.*

Impona kaj tre interesa verko, eldonita omaĝe al la Unuiĝintaj Nacioj, en la jaro de la internacia kunlaboro. La aŭtoro-kompilinto diras ke, laŭ lia scio, tiu ĉi verko estas pro sia dulingveco: nacilingva kaj Esperanta, la unua ĉi specia. Tiu ĉi rimarkindaĵo - ambaŭ lingvoj estas paralele presitaj - havigas al la libro specialan intereson, ĉar ĝi bonege servas por hispanlingvanoj kaj same por alialingvaj esperantistoj.

Alia rimarkindaĵo estas la duobla karaktero de la verko. Ĝia unua parto traktas detale pri la celo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj institucioj UNESCO kaj UNICEF, kaj dediĉas multan tekston al la Deklaracio pri la homaj rajtoj, proklama antaŭ preskaŭ 20 jaroj. Same grava kaj altcala estas la Deklaracio pri la infanrajtoj.

Tre trafe la kompilinto elektis por tiu ĉi libro la titolon „La homo sur sia vojo”; lia vojo estas malfacila, kiom ajn bonaj estas liaj gvidlinioj sur ĝi. Tion ĉiu komprenas, legante tiujn deklarciojn kaj la artikolojn anekse al ili. „La homo sur sia vojo”, diras la aŭtoro, „estas la homo en reĝimo de libero kaj de respekto al la homaj rajtoj, estas la homo libera, digna, respondeca kaj humana, konscia pri siaj rajtoj kaj devoj, survoje al superiĝo por la atingo de humaneca, frateca socio universala, en kiu regas paco, harmonio kaj amo sub la protekto de la Unuiĝintaj Na-

cioj”.

La gramatika parto ne estas supraĵa, kiel ĝenerale en propaganda broŝuro, sed konsistas el sufiĉe detalaj klarigoj pri la lingvaj elementoj, kaj el abundo da ekzemploj pri la prepozicioj kaj afiksoj. Ĝi estas vera lernolibro.

La poezia antologio konsistas el multege da poemoj, grandparte sentoplenaj, kaj ampleksas plurajn paĝojn. Kaj tie ĉi ni konstatas novan rimarkindaĵon: ĉiuj poemoj estas tradukitaj el la hispana lingvo, sed iliaj aŭtoroj estas aŭ hispanoj, aŭ anoj el preskaŭ ĉiuj hispanlingvaj republikoj de Ameriko; nur Salvadoro mankas. Kun kelkaj esceptoj nur Fernández Menéndez tradukis ilin.

Specialan ĉarmon havigas al la libro la plurpaĝe troviĝantaj fotografaĵoj, precipe pri UNO, UNESCO kaj el la Esperanta vivo, kaj portretoj de famaj homoj el kaj ekster nia movado. Komprenoble ne mankas ilustraĵoj pri la sudamerika kultura centro, Montevideo: ekspozicioj, kursoj, kongresbildo, propagando. Meditindaj sentencoj troviĝas plurloke inter la tekstoj.

Memorinde estas ke en 1954a UNESCO agnoskis la valoron de Esperanto por la scienco, la edukado kaj la kulturo. La aŭtoro prave demandas: „Ĉu unu lingvo por UNO? Kion atendas UNO por akcepti ĝin?”. Propagandacele kaj por fiksi malaltan prezon la eldonnombro de la libro estas 5000.

Sur enmetita folieto estas notitaj kelke da komposteraroj. Malgraŭ tiu zorga revizio kelkaj aliaj traglitis la kribrilon de la korektisto: 1946 (1846) (p. 82), Anna (Anne) (96, 97), mantenmanĝo (280), Mntevideo (300). Cetere diversaj eraroj koncerne la refleksivan posedan pronomon.

G. J. D.

*ĈIUJ FORMOJ DE LA PASIVO . . . .*  
*Analiza provo pri ata/ita. De Heinrich Friess, Sudetenstrasse 6, 6407-SCHLITZ (Germana Federacia Respubliko). 15 paĝoj, ĉ. 21 x 27 cm. Prezo (inkl. sendkostoj) 1 gmk. aŭ 3 steloj aŭ 2 rkp., rekte ĉe la aŭtoro.*

## ĜENA EKSCESO

Nunfoje mi havas antaŭ mi ne dikan libron kun abundo da scienca kaj filozofia materialo por pruvi ke Zamenhof per la vorto *tempo* verdire celis *aspekto*. Kontraŭe, tiu ĉi broŝuro estas trankvile kaj klarvorte verkita, ne por persvadi, sed simple por redoni la ideojn de Zamenhof mem. Rezonante objektive kaj logike, ne malŝparante nebezonatajn vortojn, la aŭtoro tenas la atenton de la leganto kaptita ĝis la lasta paĝo.

Speciale atentinde estas ke Friess, laŭ ekzemplo de Zamenhof, eĉ ne per unu vorto tuŝas la sistemon de la aspektoj. Evidente li komprenas kial Zamenhof silentis pri tiu temo. Silento ne signifas neglekton, sed lasi la temon ekster konsidero. Krome estas rimarkinde ke Friess neas la ekziston de la t.n. kompleksaj verboformoj, sed prefere parolas pri kompleksa predikato; la participojn en tiuj formoj li konsideras nur adjektivoj, indikantaj la staton antaŭ, dum kaj post la ago, sed ne la agon mem. El tio rezultas ke *ita* neniam enhavas la nocion de nedaŭra ago.

Modeste la aŭtoro nomas tiun ĉi analizon provo el propra vidpunkto, el kio mi konkludas ke li respektas ankaŭ alies vidpunktojn. Ekzemplo de liberaleco imitinda!

Resume: tre leginda kaj instrua broŝuro.

G. J. D.

## NI RICEVIS

KOREKTIGA LISTO kaj SUPLEMEN-TO n-ro 1 al POŝTSTAMPA KATALOGO de EKIK 1965.

Adreso: Anna-Greta Strönne, Amiralsgatan 36, MALMÖ, Svedujo. Jen utila suplemento al la katalogo de 1965, recenzita en N.E. de aprilo 1965, p. 39.

NORRKÖPING. Faldfolio tre alloga ilustrita kun kolorbildo. Eld. de: Informejo de la urbo Norrköping. Havebla senpage ĉe: Stadskansliet, Radhuset, NORRKÖPING, Svedujo.

EL POPOLA ĈINIO, monata gazeto en Esperanto kun sinteza enhavo, nun fariĝis monata. Abonotizo por Nederlando: gld. 2,50 por 1 jaro, gld. 3,80 por 2 jaroj, 5,— por 3 jaroj.

Peranto por Nederlando: Universala Esperanto Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Poŝtĉekkonto 37 89 64.

Esperanto estas por ni serioza afero. La tempo dum kiu eksteruloj konsideris nian lingvon neserioza tempopasigilo, feliĉe jam antaŭlonge forpasis. Kaj tamen ekzistas ankoraŭ esperantistoj kiuj, kvankam bonintence kaj nekonscie, kontribuas al miskreditigo de Esperanto. Mi celas la homojn kiuj ŝate klopodas esperantigi nomojn nepre ne esperantigindajn aŭ -endajn.

Dum la komenca periodo de nia lingvo oni esperantigis multajn geografiajn nomojn, precipe nomojn de urboj. Se tiu emo restus limigita ĝis urboj internacie sufiĉe konataj kiel Parizo, Londono, Berlino, ĝi ĝenus nenium. Sed volante konsekvence apliki tiun metodon, oni riskas ridindigi la lingvon en okuloj de l'publika, kaj fine oni puŝiĝas kontraŭ la neeblo skribi la pli multajn nomojn de urboj kaj vilaĝoj en Esperanta ortografio.

La ekstremon de senseca esperantigado oni atingas, skribante sian propran aŭ alies nomon en Esperanto. Konataj ekzemploj el la literaturo estas Ŝekspir kaj Volter. Sed ankoraŭ nuntempe kelkaj ne hezitas tiel kripliĝi nomojn. En iu gazeto mi trovis i.a. Jak Dupon (ĉu Dupont?), Johannes Bruks (ĉu Broeks?), Marsel Bezanson (verŝajne Besançon), Kevin Mak-Kourt (?), Eriŝ Maria Remark, Ĉesterton, Edgar Po, Senkjeviciĉ.

Kion la elpensintoj de tiaj kriplaĵoj celas atingi? Ĉu ĝustan komprenon pri la prononco de tiuj nomoj? Tiukaze ili plene mistrafas! La Esperanta alfabeto ja ne sufiĉas por indiki plurajn fonemojn el la naciaj lingvoj; ni pensu nur pri la nederlandaj u, eu, ui kaj la sentona e en *de*, pri la anglaj th, r, w kaj la diversaj sonoj de la vokaloj, pri la francaj nazosonoj an in, on k.m.a. Ĉu franco ekzemple rekonus en Bomarŝe la nomon Beaumarchais? Per nia ortografio ni povas nur proksimume klarigi la prononcon de naciaj nomoj, sed la nacian koloron de la nomoj oni ne sukcesas indiki. Eĉ per la science ellaborita fonetika alfabeto oni apenaŭ povas kontentige fari tion.

Sed la plej granda malutilo de tiu metodo estiĝas se ĵurnalisto, kiu ja ne povas plene scii la prononcon de ĉiuj personaj nomoj pri kiuj li skribas, intermikse uzas naciajn kaj Esperante fuŝitajn nomojn. La rezulto de tio estas ke la leganto ĉiam

## NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Aganta prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.  
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.  
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).  
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.  
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

troviĝas en embaraso kiel prononci iun nomon, ne sciante ĉu ĝi estas originala aŭ fuŝita.

Feliĉe nur tre malmultaj verkistoj „regalas” nin per tia ĝena ortografio, sed tiuj kelkaj neseriozuloj jam sufiĉas por fari Esperanton ridinda en okuloj de aliaj. Ĝi estas eksceso nepre kritikinda kaj ekstermenda. Oni konsciu ke ĝenerale ne la proksimuma prononco de iu nomo interesas la legantojn, sed la originala vortbildo; nur ĝi estas la pli grava, indifereinte ĉu oni komprenas ĝian prononcon aŭ ne.

Ĉio ĝis nun dirita koncernas nur nomojn el lingvoj uzantaj la latinan alfabeton. Por nomoj skribitaj en la cirila aŭ alia alfabeto ni vole nevole devas fari escepton, ĉar la sola eblo por prezenti tiujn nomojn estas transskribi ilin en latinalfabeto ortografio, ĉu nacia, ĉu Esperanta. El tio tamen rezultas ke ekzemple rusan nomon nederlandanoj, angloj, francoj k.t.p. transskribas laŭ siaj propralingvaj ortografioj. Tiel estiĝas diferencaj transskriboj, kelkfoje kondukantaj al miskompreno, sed tio ne estas evitebla. Ekzemplo de tio estas la diversaj formoj en kiuj la ĵurnaloj siatempe prezentis la nomon de antaŭa sovetia politikisto. Ofte oni nomis lin Krutsjef, kvankam laŭ la rusa prononco oni devas skribi Chroesjtsjov, kaj Esperante Hruŝčov. Nur se ĉiuj lingvoj uzus la latinan alfabeton, ni ne bezonus fari escepton. Sed tio estas alia afero!

Tiu ĉi kritiko kompreneble lasas ekster konsidero la pseŭdonimojn, kiujn aŭtoroj k.a. por si mem elektas, kaj kiuj havas planan ekzistorajton.

G. J. Degenkamp.

## KONCIZE

### Sociologio.

Sub aŭspicio de la Universitato de Hull (Britujo), s-ro Peter G. Forster (Dept. of Sociology, University of Hull) entreprenas sociologiajn esplorojn pri la Esperanto-movado.

### Esperanto-filmo el Hungarujo.

De la societo de Naturamikoj el Budapeŝt ni ricevis 13 fotojn el la filmo „**Esperanto Fonto**”. La filmo estas parte kun hungara kaj Esperanto-paroloj. Ĉe la hungara parolo estas Esperantaj tekstoj. Daŭro de la filmo estas 17 minutoj. Nigra/blanka, normalmezura.

La temo estas la rekonstruo de detruita fonto en kiu partoprenas gejunuloj, turistoj el diversaj landoj, parolantaj Esperanton. Ili instigas la plenaĝulojn lerni esperanton kaj partopreni la movadon. Dum la kongreso en Budapeŝto ili interamikiĝas kaj kune enaŭguras la fonton. Oni devus vidi la tutan filmon kaj eĉ kun „fakokuloj” por povi juĝi ĉu la filmo estas taŭga por la ĝenerala publiko. Cetere, bela pruvo de la diligenta laboro de niaj hungaraj samideanoj!

### Esperanto en Komerco - kvinlingva

raporto pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.

Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.